# *Internacia foiro de Havano allogas eksterlandajn entreprenistojn.*



Havano, 4 nov (RHK) Estis informite ke la 37-a internacia foiro de Havano, Fihav 2019, okazos inter la 4-a kaj la 8-a de novembro en la sidejo de Expocuba. ?i estas pruvo pri la fido de entreprenistoj kaj investistoj eksterlandaj en la kariba insulo.

La foiro okazas en cirkonstancoj markitaj de la ?usaj decidoj de la usona registaro, kiu celas izoli kaj sufoki ekonomie tiun ?i landoj, kaj pro tio la ?eestantoj prikonsideras la ekonomiajn planojn de la insuloj kaj ties potencialojn, spite al la problemoj financaj kaj komercaj.

Tiusence, la kuba ministro pri ekonomio kaj planado, Alejandro Gil, informis la dosieron de gravaj planoj por tiuj, kiuj ?eestas la foiron. Li argumentis ke la momento estas markita de la pifortigo de la sie?o altrudata de Usono, kiu malhelpas la planojn de nacia evoluigo.

En la jaro 2018 la malneta interna produkto (PIB) je konstantaj prezoj atingis 2,2%, super la planita 1,2%. Rilate eksporta?ojn la insulo plenumis sian planon en la unua semestro de 2019 kaj la petrolproduktado kreskis, kvankam ne kontentigas la bezonojn naciajn.

Oni plenumis la eksportajojn pri medicinaj servoj, tabako, rumo, fruktoj fre?aj, karbo, interalie. Tiuj ?i estas nur kelkaj indikiloj, kiuj pravigas la intereson de la partoprenantoj en Fihav por proksimi?i al negocoj en Kubo, kiuj ja estos favoraj por ?iuj partneroj.

La foiron partoprenos delegitaroj, entreprenistoj kaj landoj el ?iuj mondopartoj, entute 55 landoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/206598-internacia-foiro-de-havano-allogas-eksterlandajn-entreprenistojn

**Radio Habana Cuba**